NEKROLOGO

Fraŭlino TERRYN Juliette forpasis la 16.1 1972, 76 jara.

Ni ne plu vidos ŝin, kun la ĉiamaj pakaĵoj de dokumentoj pri financoj, ĉu de F.L.E., ĉu de B.E.F.....

Ni ne plu povos helpi ŝin, por supremonti en la vagonaron, tiom da fojoj, kiam ŝi reiris hejmen post kunveno en Bruselo ...

Ŝi ne plu akompanos nin al tiom da internaciaj kongresoj, Parizo, Varsovio, Londono, Kopenhago, Sofia, Marseille, Bruselo, Harrogate, Bournemouth,.....

Ŝi ne plu grumblos kiam la grupoj malzorgeme tro malfrue pagas la kotizojn.....

Sed kelkaj inter ni iris al ŝi por la lasta fojo: F-ino Begodt, S-roj Vandevelde, Mortelmans, Lodör kaj aliaj el Gent; S-ro Paulus de Charleroi, S-ino Meurrens de Leuven kaj S-ino De Hondt kaj S-ro Verstraeten J. el Antverpeno.

Ŝi estis certe, ke ankaŭ nia Prezidanto, S-ro Debrouwere, ĉeestus tiun lastan momenton; kaj el liaj vortoj ĉe la entombigo vi kun ni legu:

"Kara Juliette, dum tre longa periodo ni kune laboris por diskonigi Esperanton. Via firma konvinko estis, ke nur komuna helplingvo ebligus reatingi, ke la mondo retrovu la pacon kaj ke la devizo – neniam plu milito – fine realiĝu. Via ideało estas ankaŭ la nia, kaj ni solene promesas daŭre agi ĝis fina venko. Vian karan memoron ni fidele gardos"

Tiuj vortoj kvazaŭ el nia koro venis.....